

KULTO DE LA PLANTOJ KAJ FLOROJ

Kluba prelego la 3-an de marto 1992

Diferenco inter la bestoj kaj homoj estas precipe en psikologia vidpunkto. Sed ankaŭ ĉe bestoj ni konas, ke ekzemple hundo povas havi pilkon, oston ktp., kiel sian propran amatan amuleton. Tre specifice ni povas paroli pri la homaj amo kaj religio. Jam ĉe tre primitivaj homoj, kiuj vivis antaŭ multe da jaroj, arkeologoj ekkonis, ke ekzistis kultoj precipe al la Suno, fajro kaj ankaŭ al plantoj kaj floroj. Kulto estas propra interna psikologia sento. Kultaj plantoj estis en la manoj de reĝoj kaj reĝinoj, kiel ornamentoj sur muroj en temploj, kriptoj ktp. En mezepoko estis kulto de la floroj tre forta, sed ĝis nuntempo ni povas tute precize paroli pri kulto. Kiam ni donacas bukedon aŭ unu rozon, orkideon kaj aliajn florojn al niaj amatoj, tio estas kulto. Precize ni povas paroli pri kulto kiel sento al personoj familiaj, religiaj, ŝtatestraj, kaj precipe al homoj, kiujn ni tre amas. La amo kaj kulto de la floroj, precipe belegaj floroj, havas jam tiel grandan tradicion, ke ekzistas multe da libroj, teatraĵoj, poemoj, muzikaĵoj kaj ankaŭ konstruaĵoj, temploj kaj palacoj, kiuj estis faritaj pro granda amo de viroj al amataj virinoj.

Tio estas tre oftaj kultoj kaj ni bone konas tiun ĉi kulton ĉeĉiuj nacioj de la tuta mondo.

La kulton de la floroj ni bone ekkonis ankaŭ kiel simbolon de la amo pri edziĝfesto, pri naskiĝo de infanoj kaj ankaŭ pri morto de homoj. La kultoj de la floroj pri funebraj ceremonioj estas konataj jam multe da miljaroj.

Tamen ne ekzistas nur kulto de la floroj kaj plantoj pri tiuj ĉi okazintaĵoj, sed ankaŭ pro religiaj kaj medicinaj motivoj. Por tiuj ĉi celoj la homaro uzadis precipe venenplantojn kaj plantojn, kiuj havas tre pitoreskan formon. Tre konata estas mandragoro, planto kun radiko en formo de homo. Mandragoro estas simbolo de la misteraj fortoj, fortoj de hadeso, sed ankaŭ de la medicinaj magiaj fortoj. Multe da kuraciloj estis faritaj per helpo de kultaj plantoj, kaj oni uzas tiun ĉi metodon precipe en Afriko ĉe ŝamanaj kuracaj metodoj.

Kultoj de la plantoj kaj floroj estas tre viva ankaŭ en nuntempo, kaj ni povas diri, ke ĉe ĉiuj nacioj, sur ĉiuj kontinentoj sur nia terglobo.

Ankaŭ la kulto de la Kristnasko estas tre fama pro uzado de la ornamaj kristnaskaj pinoj, piceoj aŭ abioj, de kristnaskaj floroj de la *Euphorbia splendens*, oni nomas ĝin kristnaska rozo, kaj ni ĉiuj tre bone konas tiun ĉi planton kun ruĝaj folioj en formo de rondo, kiel reĝa krono.

Ankaŭ festado de la printempo estas tre forte kunligita kun kulto de la plantoj. Branĉoj de la saliko kun pitoreskaj infloreskoj, amentoj, kiujn ni ĉefe nomas "ko i ky" (katidoj), kaj kultaj estas ankaŭ galantoj (neĝborulo, "sn enka"), branĉoj kun folioj de la betulo k.s.

La kulto de la floroj estis, estas kaj estos. Ĉu tio estas bone, ke ekzistas tiaj kultoj? Certe jes. Kultoj alportas al homoj ĝojon, emociojn de la amo kaj de la kunsento. Kultoj de la floroj kaj plantoj alportas al la homaro kulturan vivon, humanisman potencon de respekto kaj honoro.